

Ludwig Uhland,
La kapelo

tradukita de Hans-Georg Kaiser

Supre tronas sur la monto
La kapelo en kviet'.
En la valherbej' ĉe l' fonto
Ĝoje kantas paŝtknabet'.

Kun funebra sonorilo
Ektimigas mortkantad'.
Finas tuj la ĝojjubilo
De la knabo ĉe l' konstat'.

La ĝojjintoj post la morto
Supren en la tombojn venos
Paŝtoknabo, laŭ la sorto,
jen ja Morto vin eĉ prenos.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de
LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 – †1862-13-11)
en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar,
1954-05-21).

Arg-639-1290 (2012-11-02 09:10:10)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html>.

Ludwig Uhland,
La kapelo

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Supre staras sur la monto
La silenta kapeleto,
En la valo, ĉe la fonto
Ĝoje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado
Nun eksonas tra l' silento, -
Haltas knabo en kantado
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto
El la valo ĉiu venos.
Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,
Oni iam tien prenos.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de
LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 – †1862-13-11) en
Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Lu-
doviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-
14).*

Arg-639-1288 (2012-11-02 16:27:28)

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas ankaŭ en www.literaturo.dk/kapelo.htm, ene de la listo
<http://www.literaturo.dk/enhavo.htm>.*